

PUBLIC LIBRARY
- 4 AUG 1921

La Suda Kruco

Organo de la Australaziaj Esperantistoj

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio)

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo aŭ 4 respondkuponoj.

N roj 10-11. Melburno (*Melbourne*), Aŭstralio.

1 Majo, 1921.

Paris Chamber of Commerce Adopts Esperanto.

On the 9th February the Paris Chamber of Commerce unanimously passed a resolution

(1) deciding to introduce the optional teaching of Esperanto into its commercial schools, and

(2) expressing the desire that the teaching of Esperanto should be made general in France and abroad, and that the Chambers of Commerce of all countries desiring to facilitate commercial intercourse should support the speedy diffusion of the international auxiliary language.

This decision, one of the most significant that has yet been made by any influential body with regard to our language, was not made without much previous inquiry and consideration. The matter was referred to the Chamber's Education Commission, which looked into the past history of our movement, being specially impressed by the international congresses, at which many hundreds of persons of various nationalities, speaking only Esperanto, have understood each other with the greatest ease, and also examined the structure and vocabulary of the language, and

put it to some severe translation tests. The commission's report conveyed the favourable results of these investigations, and also drew attention to the spread of Esperanto in the East and in Germany, and its value from an educational standpoint. Finally the commission presented the text of the proposed resolution, which was adopted unanimously and without change.

The Mayor of Milan, Esperantist.

The progress of Esperanto in the principal towns of Italy has already been noted. One of the most active supporters of the movement in that country, Dr. Angelo Filipetti, has now been elected Mayor of Milan.

The town council has for some time been favourable to Esperanto, and has had the language taught in the municipal schools. At present there are some twenty-five such classes in Milan, besides a number of private classes for adults.

The municipality has provided office accommodation for the Italian Esperanto Federation, whose seat is in Milan, and has also voted a subsidy to assist the work of that body.

N.S.W. Education Department's Support.

The Minister of Education has set aside the Assembly Hall in the department's building in Sydney for the use of the Esperanto Society, once a month.

It was originally intended that the hall should be used for the weekly meetings of the Society, but it was found that earlier arrangements did not permit of this.

The Society intends to make a feature of monthly dramatic, musical and literary programmes, in Esperanto, in this hall, which is well-known as a centre of educational activities.

Commercial Travellers Favourable.

At the annual conference in Melbourne of the Commercial Travellers' Associations of Australia on 29th March the following motion was moved by Mr. A. M. Graham, president of the New South Wales Association:

That in the opinion of this Association it is considered desirable that the Department of Education in each State should give consideration to the matter of teaching Esperanto.

The language difficulty in international trade was the principal point which Mr. Graham brought forward in making the proposal. He referred to Professor Meredith Atkinson's support of Esperanto, and the fact that it had been brought before the League of Nations.

The motion was carried after a brief debate, with the addition of the words "or any other language adopted by the League of Nations."

Coming immediately after the decision of the Paris Chamber of Commerce to adopt Esperanto, and following the adoption of Esperanto by commercial fairs in Spain, France, Italy, Germany, Finland, Portugal and elsewhere, this move in Australia is evidence of the world-wide need for an international language in international trade.

Esperanto for Journalists.

Journalism is international in these days, like all other things. So naturally journalists turn to Esperanto. In various places one finds the writer on current events writing his articles originally in Esperanto, and sending them to agents in different parts of the world to be translated into heaven knows what unheard-of languages and published in the local press.

In Labour circles, the "Workers' Esperanto Service" is now an institution in some countries. Its purpose is to translate for national labour papers news received from Esperantists of other lands, and to reciprocate by sending abroad in Esperanto similar news of local happenings.

In Hungarian Schools.

Following on the decision of the Hungarian minister for educational and religious affairs to permit the teaching of Esperanto in State and Catholic secondary schools, Bishop Peter Elek, of the Calvinistic diocese of the Danube, has given similar orders for the teaching of Esperanto in the Calvinistic high schools under his authority.

German Schools and Esperanto.

As a result of active propaganda, official approval was recently obtained for the teaching of Esperanto in the schools of Breslau (Silesia) and Chemnitz (Saxony).

It is now announced that in Breslau 1800 children, and in Chemnitz 1000, have begun the study of the international language.

The various State governments of Germany are one by one authorising the teaching of Esperanto in the schools under their charge; the latest so to do is the government of Brunswick, which recently issued instructions to the bureaux of secondary and primary education to arrange the inclusion of Esperanto in the programmes of such schools.

Commercial Fairs Use Esperanto.

The international commercial fairs, now being held in so many countries, in an attempt to readjust the world's

trade, have realised the value of a simple international language. Their advertising is directed to the whole world, and they find that though they advertise in a dozen languages, there are still some countries which they do not reach. So they use Esperanto, the one language that reaches all countries.

From Barcelona we have received an interesting illustrated circular, in Castilian, French, and Esperanto, of the second official fair, organised by the city council, to take place in the last decade of April.

The fourth Frankfurt fair has published a descriptive pamphlet in Esperanto, excellently prepared, and with many illustrations of the fair-halls and of former fairs.

The Government Esperanto Institute of Saxony has published an "Invitation to the Leipzig Spring Fair" in the form of an attractive pamphlet in Esperanto.

"Portugal Commercial e Industrial" reports that the committee of the Lisbon fair unanimously chose Esperanto as the second official language of the fair, after Portuguese.

From the second Specimen Fair of Padua (Italy), also, we have received a card of invitation (in Esperanto) to apply for details, catalogues, etc. The fair is to be held in the first half of June under the auspices of the local chamber of commerce and industry, town council, and provincial parliament.

Election of A.E.A. Councillors.

Under the new constitution, nominations for the election of councillors close on the 31st May. Ballot papers are issued to the full and associate members not later than 21 days after that date, and must be back in the hands of the Secretary, marked with the member's vote, by the 28th July. This is laid down in rule 7 (iv).

Councillors representing affiliated groups, however, are elected by the group itself, which should by the end of July advise the Secretary of the A.E.A. of the names of the councillors elected.

The annual general meeting is held in August or September. The

report and balance sheet are previously submitted to each group (Rule 11).

The officers of the Association are elected by the Council within one month of the general meeting.

A word to country members: Don't forget to nominate your councillors!

Gifts to the A.E.A.

(Last total, £22/2/-). Mrs. H. V. Tilbury, a further 2/6; Mr. P. T. B. Hudson, a further 10/- (and a promise to give £5 in all); Miss L. O'Connor, 2/6; Mr. H. Warren, £1; Mr. E. E. McKenzie, 10/-; Mr. C. A. Watson, £1; Hobart group, £1/18/-; and two other gifts (names not given), 10/- and 5/6. Total, £28/0/6.

Four members—Mrs. Purnell, Messrs. Hudson, Hyde, and Thomson—have each promised £5 on condition that five members in all make the same promise.

One gift of £5 is needed in order to gain £25 for the cause of Esperanto.

Who will make this final gift?

Japanaj Proverboj.

Profeto scias per si mem nenion.
Deŝirita floro ne povas reviviĝi.
Sepfoje falu, kaj ok... releviĝu!
Kiu estas for de sia patrujo, tiu ĉiutage pli malproksimiĝas de ĝi.
La feliĉo estas en malsejo.
Kion vi havas, tion vi ne volas.
Kion vi volas, tion vi ne havas.

Mi Umas Vin.

(La sufikso "um" ne havas difinitan signifon).

Kiel la umo ĉirkaŭ via kolo,
kiel la um' ĉe l' mano de virin'
kiel aero umas en la ĉambro—
mi umas vin.

Mi umas vin, la vorto ja konvenas,
kaj ne ofendas eĉ al la edzin';
Ŝi ne riproĉos min, se mi nur diras,
"Mi umas vin."

Anonimulo.

"Esperanto is a language as harmonious as Italian, as clear as French, as supple as Greek."—
Professor Charles Richet (Paris).

Hispanaj Proverboj.

Silenta malspritulo estos estimata
kiel scienculo.
Estu bonfaranto, nepripensante, kia
estas la ricevanto.
Kiu multe ĉirkaŭpremas, malmulte
premas.
Ne ekzistas bona fermilo, por ora
ŝlosilo.
Kiam kruĉo frapas sur ŝtonon, por la
kruĉo la malbono, kiam sur
kruĉon frapas ŝtono, por la kruĉo
la malbono.
Pordoj fermitaj ne estas, por blank-
baroj honestaj.
Kiu malproksime edziĝas, aŭ trompas
aŭ trompiĝas.
Plimulte kuracas la dieto, ol la
lanceto.
Preferinde edziĝi, ol bruliĝi.
Ju pli granda la supreniro, des pli
granda la falo.
Malmulto teruras, kaj multo kvieti-
gas.
Antaŭ la horo bravega, kaj ĉe la horo,
timega.
Patro ŝparema, filo disdonema.
Mono forgesita, nek dankita, nek
pagita.
Akvo neniam malsanigas, nek mal-
riĉigas, nek ebriligas.
Post agema akiranto, diligenta dis-
donanto.

Esperantigis R. Cordoniu.
(Murcia).

Nuntempa.

Kiu havas monon,
Tiu povas aeroplanon akiri;
Kiu havas nenion,
Tiu devos alie morti.

Al Virino.

.. El Kantoj pri Amo.

Nia mond' estas tiel malluma,
ke ne povus mi vivi en ĝi,
se forestus Vi, bela kaj luma,
Vi, Virino, sendita de Di'.
Plibeligas Vi vivon mizeran,
ĝin lumigas, simile al sun',
el nenio Vi faras misteron
kaj printempon el tera aŭtun'.
Estas Vi tiel bela kaj ĉarma,
de ĉielo sendita al ni.
Ne sur ter' Vi naskiĝis malvarma—
Di' Vin kreis el suna radi'!...

Georgo Deŝkin,

Lau Dia Elekto.

Utilas ne, ĉagreni sin kaj plendi;
Pli bone estas, ke ĝojegu ni.
Se Dio do elektas pluvon sendi,
Pluvon elektas mi!

Tradukis Estie.

La Kata-Luna Lingvo.

En mia lit' mi dormis kiel
En murotru' lacerto,
Sed je la tria mi vekigis
Pro bruoj de koncerto.

Ekstere lunradioj brilis
Sur domoj kaj sur stratoj;
Allogis ili kaj flamigis
La korojn de la katoj.

En tia hor' trankvila devus
Maldormi nur vesperto,
Sed tiuj geamantoj trovis
Ĝin bona por koncerto.

Proksime de fenestro mia,
Malsupre sur tegmento,
Virkato kaj katino kantis
Pro sia amosento.

Mi kiel lunatik' elsaltis,
Kriante pro korbattoj:
"Malbone edukitaj bestoj,
Vi estu edukatoj!"

Pistolon mi ne havis; tamen
Da botoj kaptis paron,
Kaj ĵuris ke mi sen prokrasto
Mortigos la kataron.

Do la fenestron mi malfermis;
La nokta vent' min baptis;
Mi vane ĵetis miajn botojn;
Kaj la katar' min kaptis.

Kaj nun mi estas tre malsana;
Mi kuŝas sur la sofo,
Kaj ne parolas pro raŭkeco;
Terura katastrofo!

Pro mia tuso, kataplasmo
Estas la taga puno:
Kaj dum la nokto mi nur sonĝas
Pri katoj aŭ pri luno;

Aŭ ke la katedral' min tenas
En sia katakombo
Balzamigitan kiel katon
En Egiptuja tombo.

Ne plu mi en la nokt' rigardos
La kato-akrobatojn,
Eĉ se dekdu da ili volus
Donaci dek dukatojn.

Mi povas ĝui Esperanton,
Sed dum la jaro nuna
Ne plu belsona al mi ŝajnas
La Lingvo Kata-luna.

Clarence Bicknell

En Ekspozicio.

(Antaŭ moderna pentraĵo).

— Mi certigas vin ke ĉi tio estas sceno el turmentejo.

— Kaj mi diras, ke ĝi estas batalo de tigroj en marĉo.

Oni serĉas en gvidlibreto: La pentraĵo prezentas "sunkuŝigon sur maro."

Al M * * *

El A. Tolstoj.

Ne kredu, kiam en malĝoj' preĵanta, mi diras: "Mi ne amas vin!"

Ne kredu al ondaro forfluanta, al tero ĝi reiros do en fin'.

Jam mi sopiras per pasi' malnova plena;

liberon mian prenu vi, ho mia kara,—

kaj al amata bord' kun bru' solena de malproksime kuras la ondaro. . . .

Kiev.

Boris K—v.

Al Virino.

El Kantoj pri Amo.

*

En nia mondo regas amo;
ĝi movas ĉion, ĝia flam'
devenas de eterna flamo,
ekbruligita de Adam'.
Potenca Di', kreinte homon,
por li konsolon en mizer'
edzinon kreis, Eva nomon
al ŝi Li donis, kaj sur ter'
Adam' kun Eva restos ĉiam
simboloj de eterna am',
kaj estingiĝos ĝi neniam—
de ili bruligita flam' . . .

Georgo Deŝkin.

**Sud-Australiaj Parlamentanoj
Favoras.**

Al la cirkulero dissendita al la kandidatoj por la provinca parlamento de Sud-Aŭstralio oni ricevis du respondojn; ambaŭ estis favoraj.

Sinjoro J. W. Harper respondis

"jes" al ambaŭ demandoj: ĉu li favoras uzon de Esperanto ĉe regnaj departementoj, kaj ĉu li favoras instruadon de Esperanto en regnaj lernejoj.

Sinjoro J. B. Randell skribis el Gumeracha, ke li tute favoras uzon ĉe la departementoj, kie tio estas farebla. Instruadon en la lernejoj kiel libervolan sed ne kiel devigan objekton li ankaŭ aprobas. Sinjoro Randell aldonis, ke li intencas, se la tempo permesos, mem studi Esperanton.

Ambaŭ kandidatoj estis elektitaj, kaj estas membroj de la reganta (Liberala) partio.

Malfeliĉe, sinjoro F. W. Coneybeer, kiu estis ministro de instruado dum la unua Aŭstralia kongreso en Adelajdo kaj iom favora al nia movado, perdis sian lokon en la parlamento. Ĉeestintoj al tiu kongreso sendube memoras la gajan kriegon de aplaŭdo, kiam sinjoro Coneybeer, parolante al la kongresanoj, eĉ uzis frazon en Esperanto: "La horo malfruigas," kiun li, tre tre nova Esperantisto, elparolis "La oro malfruigas" (kun akcento sur la "u").

**Departemento de Instruado
en N. S.-K. Helpas.**

Laŭ decido de la ministro de instruado de la provinco Nova Sud-Kimrujo, la departemento disponigis al la Sidneja Esperanto-Societo grandan salonon en unu vespero ĉiumonate.

La ministro eĉ deziris, ke la societo havu la salonon por siaj ĉiusemajnaj kunvenoj, sed pro granda nombro da aliaj uzantoj tio ne estis ebla.

La societo uzos la salonon por propagando kaj praktika elmontrado de la lingvo (per teatraĵoj, koncertoj, literaturaj paroloj, ekspozicieto, k. t. p.) al la diversaj pedagogiaj societoj, kies centro estas en la sama loko.

THE "SUDA KRUCO" IS NOT RICH—IN MONEY!

It would be a great help if you renewed your subscription NOW.

Send 4/6 to Box 1367, Elizabeth-st., P.O., Melbourne, or hand it to your group secretary.

Ni antaŭe dankas!

Tiu ĉi oficiala subteno donata de la departemento de instruado en la plej granda provinco de Aŭstralio nepre havos gravajn sekvojn.

Kongreso de Vojaĝ'antaj Komizoj Favoras.

Ĉe kongreso en Melburno dum Pasko de la Aŭstraliaj asocioj de vojaĝantaj komizoj (Commercial Travellers' Associations), la sekvanta rezolucio estis alprenita:

Ke laŭ la opinio de ĉi tiu asocio estas dezirinde, ke en ĉiu provinco la departemento de instruado konsideru la instruadon de Esperanto aŭ de iu alia lingvo alprenita de la Ligo de Nacioj.

La rezolucion (sen la lasta parto) proponis sinjoro A. M. Graham, prezidanto de la asocio de vojaĝantaj komizoj de Nova Sud-Kimrujo, kiu memorigis la kongreson pri la lingva malhelpo en internacia komerco, pri la forta subteno de sinjoro Meredith Atkinson (profesoro de ekonomio en la Melburna universitato) al Esperanto, kaj pri tio, ke oni konsideris Esperanton ĉe la kunveno de la Ligo de Nacioj.

La debato estis mallonga, sed ne tre fervora. La delegito el Okcident-Aŭstralio (sinjoro R. H. Maxwell), kiu subtenis la rezolucion, opiniis, ke oni okupos centon da jaroj farante Esperanton la komuna dua lingvo, sed "vidis nenion malbonan en tio, ke oni komencas la movadon."

La ĝenerala sekretario de la asocioj (sinjoro J. M. Davies) rimarkigis, ke "ekzistas timinda opozicio al Esperanto kiel universala lingvo en Eŭropo nuntempe," kaj laŭ lia propono oni aldonis la lastajn vortojn al la rezolucio ("aŭ iu alia lingvo alprenita de la Ligo de Nacioj").

La iniciaton en ĉi tiu grava paŝo ni ŝuldas al la vigla samideano kaj delegito de UEA en Barraba (N. S.-K.), sinjoro E. A. Pryke, kiu interesigis sinjoron Graham pri Esperanto kaj instigis AEA-n, ke ĝi provizu lin per argumentoj kaj informoj.

Kroniko.

Brisbano, Kv.—La kurso oficiala starigita de la universitato ĉe Instrua Asocio de Laboristoj la progresas bone sub la gvidado de sinjoro H. W. R. Holken.

Edziĝis du fervoraj samideanoj sinjoro J. H. Cadell kun fraŭlino Ethel Taylor. Al ili bondeziras feliĉo kaj riĉo!

Auklando, N.-Z.—La socialisma grupo rekomencis siajn kunvenojn ĉe 175 Symonds-strato. Ankaŭ funkcias grupoj en Palmerston North kaj Christchurch. Membri vizitinta feministan kongreson Ĝenevo (fraŭlino M. McCarthy) alportis saluton de Svisaj al Nov-Zelandaj samideanoj, kaj raportis pri interesaj renkontiĝoj kun alilandaj Esperantistoj.

Melburno, V.—Ĉe klubo de Anglikana preĝejo de Sankta Andreo en Middle Brighton, sinjoro C. W. Ballard (delegito de UEA) faris propagandan parolon. Ĉefa parto de parolo estis leciono de la lingvo, kiu vekis grandan intereson. Oni atendis bonajn sekvojn.

Kostumbalo organizata de sinjoro Rawson kaj Pyke havos lokon en 1a majo, por festi la ekiron de la karavano al la XIII-a kongreso sinjoroj Pyke, Rawson kaj Hudson.

En lasta tempo Aŭstraliaj Esperantistoj en kelkaj centroj havis plezuron renkonti doktoron Sydney Whitaker, kuracisto de la ŝtato "Ascanius" (Blu-Fumtuba Linio) malnova samideano el Liverpo (Anglujo), kaj prezidinto de la tiu grupo. Ni esperas, ke ni ankoraŭ refoje vidos la afablan vizitanton kies alesto por ni en nia lando estis tiel granda plezuro.

Sidnejo, N.S.-K.—

Ĉe kunveno de la asocio de lernejestroj, sinjoro P. J. Bennett estro de la lernejo en Dumbleton apud Hurstville, faris propagandan parolon. La kunveno okazis en granda salono (assembly hall) de departemento de instruado; sub granda nombro ĉeestis, kaj sinjoro Bennett ricevis bonan akcepton.

Gore Hill, apud Sidnejo.—Sinjoro Johano Joliffe, prezidanto de Sidneja Esperanto-Societo, kondukis kurson kun dek kvin lernantinoj en la Movern Garden lernejo. Ki

deziras korespondi kun ĉi tiuj kursanoj, bonvolu skribi al la sekretario de SES, sinjoro L. E. Pfahl, Clissold-parade, Campsie, Sydney (Aŭstralio).

Williamstown, Melburno, V.—Ĉe la altlernejo ĉi tie oni starigis kurson inter la superaj lernantoj, kun la aprobo de la lernejestro, kiun inter-sigis pri Esperanto sinjoro Redfern, konsilanto de AEA.

Lavender Bay, Sidnejo, N. S.-K.—Kurso por knaboskoltaj estas komencita.

Esperantista Edzig'o.

En Győr (Hungarujo) okazis la 4-an de januaro la edziĝa festo de la malnovaj samideanoj Kardos kaj Edinjo Buretiĉ en la tiea episkopa preĝejo. La ceremonion faris prelato Giesswein, kiu ankaŭ faris tre belan kaj interesan Esperantlingvan parolon al la nova paro. Do, ĝi estis tute Esperanta edziĝofesto.—“Esperanto Triumfonta.”

Pri la sama prelato, monsinjoro A. Giesswein, kiu de multe da jaroj subtenas Esperanton, ni legas en “Esperanto,” ke li vizitis kun Hungara ekonomia delegitaro Polujon, kie li estis akceptita de la Varsoviaj grupoj. Li vizitis ankaŭ la vidvinon de doktoro Zamenhof, kies saluton li kunportis por la Hungaraj samideanoj.

Gallipoli.

La nomo de la fatala loko, kie trovis la morton Angloj, Aŭstralianoj, Francoj, Germanoj kaj Turkoj, reaperas en pli ĝojiga internacia sfero. La urbo havas multe da Rusaj rifugintoj, kaj inter ili kolonelo Illaŝević, malnova samideano el Kiev, organizis kurson de Esperanto. Mankis libroj kaj eĉ papero, sed kun la helpo de la Pariza Centra Oficejo, kiu ankaŭ helpis ilin akiri aliajn bezonaĵojn de la vivo, la manko estis forigita. Tiel efikas la internacia helpemo de la Esperantistoj.

La sekretario de AEA dankas al sinjoro C. H. Kamp, el Pakenham, Viktorio, kaj sinjoro Henriko Hansen, el Brisbano, Kvinslando, por afabla donaco de poŝtmarkoj.

Sinjoro Delsudo Vojag'as.

La “Rotomahana” estas brava ŝipo, sed la “Rip,” la marpeco inter la Melburna golfo kaj la plena maro, estis en tiu tago tre malkvieta. Kiam mi eniris la fumejon, unu pala sinjoro kuŝanta sur kusena benko invitis min veni kaj esti malsana kune kun li. Kiel oni povas rezisti tian inviton? Mi ĝin ne rezistis.

Tasmanio estis la celo, kaj en la sekvanta mateno mi eksidis en trajno ĉe Burnie por iri ĝis la minurboj apud la okcidenta bordo. Ni ekiris. Ni iris. Ni iradis. Ni pene grimpis supren sur montflankoj. Ni rapide kuris malsupren en valojn. Kaj ĉie ni serpentiris. La fervojo—efektive tri fervojoj; unu regna fervojo, kaj du kompaniaj fervojoj—spirale tordis sin kaj volve tiris sin inter senfina arbaro de eŭkaliptoj, apud riveroj tekoloraj pro la minerala enhavo, apud krutaj intermontoj, ĉe abismoj de roko, en profundaj fosoj, sur altaj digo, por dek du horoj. Kaj la montaro (nenie en Tasmanio oni estas ekster vido de montoj!) sin levis, jen ĉe la horizonto, jen tre proksime, blua, perla, griza, viola, purpure ŝtala, eĉ ruĝeta, kun segilforma supro, kiel vera “sierra.”

Da montoj ni vidis multe, sed da homoj—malmulte. Post ĉiu kvino aŭ seso da mejloj, la trajno haltis ĉe izolita dometo en arbaro, kaj eĉ ni trapasis tri verajn urbetojn kun metalminejoj, flankaj fervojetoj perdiĝantaj en arbaron, kvarpiedaj turoj super la ŝaktoj, kaj vastaj masoj—veraj montetoj—da blugriza tero eltirita el la profundo. Homoj—ne multaj!—en—kaj el—iris la trajnon, diskutis la veteron, minadon, arbaron, laboron kaj parencojn. En tiu malmulte loĝata regiono, ĉiu homo konas ĉiun homon, kaj konas ankaŭ liajn parencojn. “Via nomo estas Henderson? Vi do estas frato de la Dick Henderson, kiun mi konis en Zeehan?” “Ĉu vi konas lin, do? Kaj kiu povus esti via nomo?” (Idiotismo: oni ne demandas, kiu estas via nomo, sed kiu ĝi povus esti!) “Mia nomo estas Grant.” “Ĉu Grant? Mi konis vian patron en Waratah, kiam li havis negocon tie!” Kaj tiel plu, ĝis iu ekparolas je tre alloga temo, “ozi.”

Nu, tiun vorton "ozi" mi unue prenis por "Aussie," la soldata amnomo de Aŭstralio. Sed ĝi estas eĉ pli ama ol tio. Ĝi estas amnomo de metalo, kaj tiu metalo estas osmiridiumo, la plej malmola kaj plej multekosta metalo en la mondo, tiel oni informis min. Vi, kiuj havas amasojn da oro, vendu ĝin kaj aĉetu "ozi"-on, ĉar la prezo, jam nun je kvardek funtoj por unu unco, kredeble altiĝos al cent funtoj. Via oro, tiu flava pezego sur korpo kaj konscienco (ĉu la amo al oro ne estas la radiko de ĉia malbono?) estas senvalora bagatelo apud tiu diamante, agate malmola metalo, kies eroj tre similas (laŭ la specimeno, kiun oni montris al mi zorge ŝtopitan en botelo) al fajlitaj ŝtaloj. Kie estas via trezoro, tie estos ankaŭ via koro, kaj la koro de multaj Tasmanianoj sin trovas en botelo—firme vatita boteleto da osmiridiumo.

Mi kuraĝas aserti, ke ekzistas Tasmania tipo. Ĝi estas laŭ mia observo blonda, kun kvadrata vizaĝo (sed ne kvadrata kapo; ne malkomprenu min!) kun ŝtale bluaj okuloj kaj firma buŝo. Alia speco havas brunajn okulojn, rozan vizaĝon kaj diafanan haŭton, kun sama firma buŝo kaj kvadrata vizaĝo (sed ankaŭ ne kun kvadrata kapo!)

En la fino de longa tago, post pena grimpadum la sunsubiro sur den-trada fervojo laŭlonge de la arbom-brita bordo de rivero King, ni trovis nin en Queenstown, mirige granda, moderna, solida urbo, sed pli miriga estis la ĉirkaŭanta montaro. En tiu verda kreskoriĉa insulo Tasmanio, kun siaj senfinaj arbaroj, kun sia abundo da sukplena herbo kaj arbustaro—en tiu plej fruktodona parto de Tasmanio sin trovas unu makulo sekega, senakva, senkultura. La tuta montaro ĉirkaŭ Queenstown, la montoj Lyell, Owen kaj aliaj, prezentas la akran kontraston de dezerto kun floranta oazo. La kaŭzo? La sulfura fumo el la metalfandejo, kiu forprenas la vivon al preskaŭ ĉiuj kreskaĵoj, donas al la tero akre grizan koloron de kvarca roko, anstataŭ la kutima bonvola verdo de la insulo. En brilegaj tagoj, kiajn mi trafis, la okulojn blindigas la reflektado de la suno—kaj en la nokto estas same, ĉar Queenstown havas la plej

helegan elektran lumon, kiun mi iam vidis.

En Queenstown kaj la tuta okcidenta Tasmanio oni kutime mezuras la pluvon ne laŭ centimetroj, sed laŭ metroj. Sed mi estis feliĉa, kaj sub vasta, blua firmamento vagis sur la apuda montaro. Ĉie oni vidas la laboron de la "Co.": tiel oni nomas la Minan kaj Fervojan Kompanion de Monto Lyell. La granda minejo mem, la fonto de ĝia tuta agado kaj riĉo, estas tre simpla afero. Simple vasta truo en la monto, kiel kratero de vulkano, sur kies flankoj sin movas laboremaj formikoj-homoj. Nur tion povas vidi la ordinara, laika, ne-profesia, neinstruita persono, sed el tiu kruda truo oni eltiris tutan urbon fervojojn, fabriкеjon, turistan vizitejon kaj senmezuran kvanton da metalo.

Kaj la veturo al tiu minejo! La unua parto estas farata per la plej rava fervojo, kiun mi iam veturis. La vojo estas malvasta, nur sesdek centimetrojn, la vagonoj ne havas murojn, oni devas grimpi tra la kvazaŭmurojn inter diagonalaj traboj, la benkoj estas el granite malmola ligno, kaj risortoj ne ekzistas. Sed la fervojo iras tien kaj reen sur la montflanko en la plej sorĉaj allogaj kurboj, turnoj, re-turnoj, trans pontetoj, en fosetoj, sur digetoj: kvazaŭ fervojo-ludilo de la infaneco subite viviĝas antaŭ niaj okuloj kaj funkcias per si mem kun vere vivantaj pasaĝeroj kaj vere vivanta lokomotivisto! Kaj tiam la kablofervojo! Ŝarĝvagonoj tirataj per metala kablo grimpas sur krutega deklivo je 45, 40, 30 gradoj—oni ne scias je kioma kruteĉo; kaj kie la vojo estas plej kruta, tie la vagono plej rapidas.

"Suprenflugi volus mi kun alaŭdeto,"

mi deklamis al mi mem, kaj samtempe konsideris la eblan rezulton, se la kablo rompiĝus. Kiu tiam raportus la vojaĝojn de sinjoro Delsudo?

Sed la kablo ne rompiĝis, kaj sinjoro Delsudo vizitis pluajn lokojn: la fandejon, kie el kruda teraĵo, oni eltiras per longa serio de procedoj senfinan serion de metaloj, ĝis fine la teraĵo ne enhavas ion plu eltireblan kaj oni ĵetas ĝin sur la nigran amason da rubo, kiu jam ampleksas

ses milionojn da tunoj. La pro-
cedojn oni klarigis al mi, sed la
knaro de la maŝinoj, la muĝado de la
fornoj, la kirlado de akvo, la
susurego de la aerblovo, la zumo de
elektro, la siblo de vapore, la frakaso
de ŝutita teraĵo, la grinco de falanta
metalo—ĉio ĉi tiel same malhelpis la
komprenon, kiel ĝi surdigis la aŭdon.
Sed du ĉefaj impresoj restas: unu
estasodoro de eŭkaliptoleo, kiun oni
uzas en unu procedo, kaj la alia estas
blankhara, trankvila, kvazaŭ netera
ermito-elektristo, en kaverno de
kapturnaj elektraĵoj radaroj—kaj
elektraĵoj fluoj de nekredeble danĝera
forteco, kiu rigardis sian armeon da
grandegaj komutiloj kun la patra
zorgo de antikva ŝafgardisto por siaj
ŝafoj.

Du tagojn poste, sinjoro Delsudo
estis en kortuŝa, emociiga situacio:
li estis senmona. La banko, al kiu
li konfidis sian monon, ne trans-
sendis ĝin, kaj li devis telegrafi al
amiko por ricevi fincan helpon.
Tamen la manko de mono ne mal-
helpis la plezuradon (ĉu niaj regantoj
ja ne plendas pri samspeca mal-
ŝparo?), kaj mi iris per malnova,
malrapida ŝarĝosipo sur rivero
Gordon, fama pro siaj reflektaj kaj
siaj arb- kaj arbust-kovritaj bordoj.
Sed la vetero ne favoris; pluvigis kaj
blovis, kaj nur malofte estis sufiĉe
kviete, por vidi la reflektajn, kaj eĉ
la nebulo kaŝis foje la bordojn. La
ŝipon plenigis fortmuskolaj arbaristoj
—honestaj, simplanimaj, pensemaj
homoj—per arbotrunkoj de la tiel
nomita celeria pino, kaj vere ĝi estas
trafe nomita. Oni kredus, ke la
arbetoj estas celeriaĵoj pecoj por la
tablo de giganto. Kun plena ŝarĝo
ni revenis al Strahan, la urbo son-
ĝanta pri sia pasinta grandeco, kaj
forlasis niajn kunulojn de la dutaga
rivera vojaĝo.

Tasmanio ne estas granda lando;
proksimume ĝi estas same granda,
kiel Irlando. Sed pro manko de
rekta fervojo, mi devis uzi du tagojn
el mia karega libertempo por trajna
veturo ĝis Hobart. Ĉie la sama
montaro, la dolĉa, ridetanta, verda
kamparo, la densa arbaro, kaj la
sama serpenta vojo, kaj ĉe la fino de
tiu dutaga irado, iu demandis min,
ĉu mi memoras tiun lokon, kie la
vojo estas en formo de huffero.

Huffero! Mi apenaŭ vidis ion alian,
ol hufferaj kurboj dum du tagoj!
Ĝuste tia sama homo, kiam oni pre-
zentis al li mian humilan personon,
kiel prezidanton de la Sidmelbarta
Esperanto-grupo, rigardis min severe,
de kapo ĝis piedoj, kaj demandis:
“Kial oni faris vin prezidanton?”

Verda stelo ekbrilis sur la stacio
de Hobart, kaj samideana mano
ekpremis la mian. Hobartaj sami-
deanoj akceptis kun Hobartana-
samideana gastamo la vaganton, kiu
maldanke forkuris el ilia urbo post
du-tri tagoj, por reviziti la urbon de
la tria kongreso, kiu estas ankaŭ lia
hejmurbo. En sia hejmurbo li ĝuis
la lastajn tagojn de sia fulme for-
fluginta libertempo; kaj fine, en unu
tragedia lunda mateno, li revenis al
Melburno, al grizo, tede, monotono,
laboro, en la lando de la suda kruco
kaj de “La Suda Kruco.”

A. Delsudo.

“La Minaco de Esperanto!”

En ŝerca skizo sub tiu titolo, la
gazeto “Smith’s Weekly” asertas, ke
la propono, instrui Esperanton en la
lernejoj, kaŭzis grandan konsternon
ĉe la urbkonsilantoj de Sidnejo. Ili
timas, ke de nun ili devos paroli ĉe
la kunsidoj de la konsilantaro en
Dail Eireann (“Irlanda parlamento,”
ne nomo de lingvo!) aŭ en Esperan-
to.

Aliaj gazetoj ankaŭ raportis pri
nia movado, pli serioze:

En “The Australasian Manufac-
turer” (Aŭstralazia Fabrikisto)
aperis kelkaj leteroj pri komerca
utilo de Esperanto, interalie traduko
de letero el la “Internacia Komerca
Revuo” (Svisujo).

“Auckland Labour News,” laborista
revuo en Aŭklando, N.-Z., daŭrigas
sian paĝon de notoj pri Esperanto.

Hobarta “World” presis tradukon
de peto por helpo al Hungaraj
mizeruloj.

Taggazetoj en kelkaj provincoj
raportis la rezolucion de la kongreso
en Melburno de la vojaĝantaj komizioj
pri la instruado de nia lingvo.

Ankaŭ pli-malpli atentis nin:
Sidneja taggazeto “Sun” (dufoje),
Melburna “Advocate” (La Papo kaj
Esperanto), kaj “Alert” (Sidnejo).

Recenzo.

Heinrich Heine: Elektitaj Poemoj: tradukitaj de Friedrich Pillath. Nova Esperanto-Biblioteko, n-ro 6. Eldono de Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin S 59, Germanujo. Prezo, 3 markoj plus 80 pro cent.

La korpikanta Heine, la poeto de la homa malĝojo, kaj tial vere internacia poeto—ĉiam oni turnas sin al liaj verkoj kun freŝa intereso, kaj ĉiam oni ĉerpas el ili freŝan plezuron. Sinjoro Pillath donis al ni en ĉi tiu tre bela volumo dudekon da poemoj saĝe elektitaj kaj bone tradukitaj. Oni trovas kelke da malnovaj amikoj—Mi Komence Malesperis, Pinarbo Staras Sola, Du Grenadistoj, Donna Klara—kaj la ceteraj estas indaj je varma loko en la koro de ĉiu amanto de la lirika poezio. Unu malgrandan perlon ni povas citi:

Milde pasas tra la kor'
dolĉa harmonio;
en printempon sonu for
eta melodio.

Al floranta idili'
flugu vi sonore;
se renkontos rozon vi,
ĝin salutu kore!

La kanto "La Grenadistoj" jam tradukita de la lerta Leo Belmont, havas viglan ritmon, kaj la traduko estas pli glata kaj preferinda je tio de Belmont. Mi kredas, ke ĉiu Esperantista versfaristo komprenanta la Germanan lingvon tradukas la plej konatan el ĉiuj verkoj de Heine tiun pri la pino kaj la palmo. Sed ankoraŭ mi ne vidis iun egalan al tiu de Zamenhof. Sinjoro Pillath certe faris tre agrablajn tradukon, sed iel ĝi ne havas la genian simplecon kaj glatecon de la Zamenhofa traduko. La du pecoj, "Mara Fantomo" kaj "Epilogo," kvankam tre ĉarmaj, estas ne poezio, sed prozo; la tiel nomata "libera versaro" estas tre malfacila formo de la poezia arto.

De lingva vidpunkto, se oni estas uzon de "vipero" anstataŭ "vipuro," kaj "pamfleto" anstataŭ "broŝuro," la libreto estas nerigorebla. Oni notas "murdri" en senco "hommortigi, krimmortigi," la vorto ja estas internacia. verko portas la rekomendon de Esperantista Literatura Asocio.

Propagando en Malliberejo

La laboroj de la fervora gvidanto de la movado en Nov-Zelando, sinjoro W. L. Edmanson, inter la multaj beruloj de tiu lando, jam havigas bonan frukton. Niaj legantoj memoras, ke en la malliberejo de Aŭklando, kun la aprobo de la juĝisto (kavaliro Roberto Stout, malnova Esperantisto) kaj de mallibereja aŭtoritato, oni starigis grupon por la studo de Esperanto kaj eĉ estis permesite al la lernantoj korespondi kun eksteruloj.

La grupo tiel bone progresis, sinjoro Edmanson, ke unu el la grupo jam akiris la diplomon de BEA, ricevis kelkajn leterojn skribitajn de aliaj grupanoj montrantajn tre bonan konon de nia lingvo. La eksperimento havis plenan sukceson, ankoraŭ unu fojon estas pruvita valoro de homama studo tia, Esperanto.

El unu el tiuj leteroj ni ĉerpas jenon:

"Estimata amiko mia:

"Via lasta, sub dato 19.1.21 atingis min, kaj kiel feliĉa mi estis scii, ke vi ree skribis al la karaj raportante la okazaĵojn plene. Mesu al mi ree danki al vi pro senlacaĵo pri mi, kaj nek mi danki la gepatroj, iam povos danki vin pro ĉio, kion vi faris. Jes, sinjoro, mi subtenos la kondukon de la klasanoj, kaj mi permesos al iu fari ion, kio kaŝas malbonan raporton de la karcere-

HAROLDO PUDNEY

Kuracisto de Fonto-Plumoj

Ĉu vi havas kriplan fontoplumon, kiu malhelpas vian skribadon? Por ĝin al li, kaj li tute rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontoplumon Por VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Mendoj per poŝto estas lia specialo. Mendoj la adreson:

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE.

La ĉefo jam permesis al du aliaj ĉeesti por anstataŭi — kaj —. Jes, amiko mia, mi ankaŭ antaŭenrigardas la okazon renkonti vin en Wellington. Kiel perdita mi sentos min, estinte tiel longe en karcero. Ĝi similos duan naskigon.

“Ĝis la proksima,

“Mi restas,

“La via sincere kaj dankeme,
_____.”

La Serpento.

El “*Visions de l'Inde*” de Jules Bois.
I.

Ni jam estis kuŝigintaj kaj mi ĉestis mian lampeton estinginta, kiam mia servisto, kiu estis kutime sub la vitroĉambro, alkuris timigite:

“— Sinjoro, kobraserpento ĵus eniris en la domon. Mi vidis ĝin kiam ĝi transiris la pordon de via ĉambro.”

Mi leviĝas rapide. Kobro! nokta serpento, kies vundoj estas mortigaj, la besto-dio adorata, per kiu Shiva ĉirkaŭas sian kolon kiel per vivanta silkutuko, kaj kiu ĉiujare mortigas milojn da loĝantoj nudpiede irantaj tra la kamparo.

Rapide ni rebruligas la lampon kaj ni serĉas.

Kiom ofte, en la ĝardenoj, ĉirkaŭ tiu malfermita domo, mi kredis aŭdi la malamikon glitantan. Sed, ĝis hodiaŭ, mi ekvidis ĝin nur pajoŝtopitan en muzeoj, aŭ molan kaj sendentan en manoj de fakiroj. Ĝia ideo, ĝia figuro min senĉese vizitadis, en tiu lando kiu tute estas ĝia, kiun ĝi kreis sama kiel ĝi. Tra Hindujo oni vidas ĉie la serpenton: en la ondolinia fleksebleco de la virina korpo, en la brilaj kaj malsekaj okuloj de la almozuloj sanktaj, en animo mem de la loĝanto.

Mi akceptis konsilon, neniam nudpiede marŝi tra mia ĉambro, kaj ĉiam, antaŭ ol mi ekdormos, mi rigardis sub miajn littukojn, ĉe kiuj la kobro plezurege plivarmiĝas.

Nune, ni tuj nin renkontos. Kaj frosttreme mi pensaske, ĉi tiun nokton, ĝi estas tie ĉi, la rampanta dio, decidinta — malgraŭ mia volo, ja vere — ke ĝi min vizitos. Li povas min fulmofrapi per pikvundo, pro mallerta gesto kiu ĝin atingus... Ĉiuj kuraciloj estas proksimume senefikaj, escepte la serumon de doktoro Calmette, tre uzata en Hindujo...

Kaj mi havas nenian kuracilon ĉe mia loĝejo.

Mia servisto, per bastono, levas antaŭzorge la tapiŝojn, rigardadas la vestojn, esploras la ŝrankojn.

— Sinjoro, la kobro ne atakos vin. Sed se vi ektuŝetos ĝin, vi estos mortigata. Ĝi leviĝos, ŝveligos sian kolon kaj pikvundos. Tio estas subita kaj nesaniĝebla.

Ni vane serĉas. La dometo estas cetera preskaŭ malplena, facile observebla. Nenio. Mi fine trankviligas. Mi scias, ke mia servisto, kvankam mahometano, volonte drinkas por ĉirkaŭe dudek centimoj parfumitan likvoron, kiu konsistas el miksaĵo de sukero, floroj kaj opio... Sendube senteraro lin trompis. Mi rekuŝiĝas kaj resendas lin en la vitroĉambron.

II.

...Sed tra la mallumo — ĉu ja mia imago laboradas? — ŝajnas, ke io vivanta, mola, moviĝas per paŝo de fantomo, glito de ŝtelisto. Mi aŭskultas, mi timas — jes, mi konfesas, ke mi terurege timas — ĉar nune murmuro estas aldonita al la bruoj; ĝi estas bloveto apenaŭ aŭdebla, dolĉa fajfo, daŭra, lingvaĵo de nevidebla, malglora besto. Mi rebruligas, ĉio silentas, mi nenion vidas...

Mi denove estingas: la brueto rekomenciĝas. Mia timo iĝas netolerbla. Mi memoras, ke ofte la kobro volviĝas ĉe la traboj de la plafono, falas preskaŭ senbrue sur la kulovuŝalon kaj ŝoviĝas al la varmo de la lito. Leviĝi, dormi kiel mia servisto en la vitroĉambro, mi pri tio pensas, sed mi timas la febron kaj la kulojn kaj aliajn bestojn. Mi nur ne estingos mian lampon, kies lumo min protektos, kaj mi ĝis la mateno ne dormos.

Cetera la printempo estas varmega; iom post iom la bestaro de Hindujo, vekiginta el sia vintra dormado, enpenetras en la homajn domojn. La gento de la kuloj okupas per densaj nuboj la trionon de la loĝejo. Tiu ĉi laŭteta orkestro neniam silentas kaj zumadas tiel unutone, ke, aliajn noktojn, ĝi ne malhelpis, ke mi dormu. Ranoj kantas en mia lavoĉambro, lacertoj promenas tra la plafono; mi memoras eĉ ke, antaŭ du tagoj, skorpiono estis en mia pantoflo...

Sed mi tie ne ankoraŭ spiris la atmosferon de serpento. La fenestroj de la tegmento paliĝas. La tagiĝo venas; mi ekspiras pli libere: al mi ŝajnas, ke la danĝero estas for!

Mi kuras al la lavoĉambro; mi lavas min ĝoje post tiu sendorma nokto da febraj ŝvitoj. Apenaŭ mi estas seka, kiam mia servisto alvenas.

Lia mieno estas pli enigma ol ordinare, ŝajnas eĉ ke li hipokritas. Mi sentas, ke li tuj agos kontraŭ mi, kiel kontraŭ blanka homo, kontraŭ malamiko, kiun oni timas kaj kiun oni trompas. La profundegaĵo, kiu apartigas la rasojn, iĝas pli kaj pli profunda. Kion ja li volas?

— Sinjoro, ĉu vi volas mortigi la serpenton?

— Unue mi volus ĝin trovi. Tio estas tiel malfacila, kiel necesega.

— Vi volas do ĝin mortigi?

— Kial do ne?

La servisto silentas. Mi observas lin: li iĝas pli kaj pli hipokrita kaj kaŝema: liaj palpebroj estas kovritaj. Mi sentas, ke mi nenion per li faros, se mi ne faros tion, kion li pensas.

— Ĉu vi ne mortigus la serpenton, junulo?

— Sinjoro, estas malbone mortigi la bestojn.

— Sed vi ne havas la superstiĉojn de la Hindoj: vi estas ja mahometano...

— Tio estas egala, sinjoro, la serpento estas sankta.

— Sed se vi ne mortigos ĝin, ĝi mortigos vin.

La junulo faras geston indiferentan:

— La morttago de ĉiu estas enskribita en la libro de Allah.

Mi pripensas. Vere, kial mi mortigus la serpenton? Nur sendorman nokton ĝi kaŭzis al mi. Mi timis, sed tio instruis min pri la respekto al bestoj, eĉ malutilaj; ĉiu devas ludi rolon en la Universo; plie, la Naturo, nia patrino, konsistas ne nur el amindaĵoj, belegajoj; mistero de kruelecoj estas ankaŭ en ĝi kaŝita. Tigro kaj serpento estas pri tio vivantaj simboloj. Kial ilin malami?

— Mi ne mortigos la serpenton, ĉar tio enuigas vin... Sed, kondiĉe, ke oni je ĝi baldaŭ min liberigos.

La malluma haŭto de mia servisto ŝajnas vere heliĝi. Mi kontentigos

per li la genion de la raso. Li la parolema kaj konfidema.

— Mi alvokos tuj la "snakeman" sinjoro (serpentĉarmiston). Por rupioj, li prenos la serpenton, kiun floron, kaj, sen vundo, transponos ĝin malproksimen en la kamparoj. Se vi ne estus promesinta ĝin pardoni, vi estus devigata pli kare pagi, ĉar la snakeman estas Hindu, li respektas serpenton, kiel korpigon de la Shiva mem, kaj, ĝin mortigante, estus grandege pekinta.

Mi ja komprenis: la devo servisto estas elŝiri el la sinjoro kiel eble plej monon; dum la nokto, la junulo, post liaj preĝoj al la Profeto, pripensis, kiel li mem ŝtelos; kaj aventuro de la serpento estis neantaŭvidebla okazo, ĉar mi fariĝis divenas ke li ja dividos la gajnon kun la snakeman. Eble li mem alkondukis la kobron en mian ĉambron por eksciti mian malavarecon.

III.

— Sinjoro, mi ĵus alkondukis la snakeman. Li estas tie, ĉe la vitro ĉambro, kun fluto kaj korbo.

Certe la sceno estas antaŭe preparita. Mi akceptas agi tiel, kiel vi volas la junulo, kaj cetere mi estu kontenta, sciigante kiel tiu artisto povos eltrovi la hindan serpenton.

Li estas tute nuda, beleta, malgranda, lia maldikeco, kun malgranda tuta kunligita ĉirkaŭ lumbo, kaj li estas strange simila al la serpento, kies ĉarmisto li estas.

Li neniel parolas angle, kaj, por elparoli, li fajfas inter siaj dentoj mallongaj. La okulo estas iom flavo, la kranio plata, preskaŭ raza; nur unu harmeĉo kuŝas malantaŭ la dorso, kie ĝi saltas kiel nigra vipuro ĉirkaŭtalo kun grandegaĵo buton kunvolviĝas ĉirkaŭ lia talio fleksebla kaj moviĝema. Per siaj kruroj faras tion, kion li volas; ili estas kolubroj kiuj turniĝas, kunvolviĝas kaj malvolviĝas laŭvole.

Li salutas min tre respektman levante manon al sia frunto, kie estas tatuata la tridento de Shiva, kaj kiam li releviĝas, li havas la movon me de kobro, kiu leviĝas por piki.

El sia korbo li eligas fluton, kaj promenadas tra mia ĉambro per paŝoj malrapidaj, ludante bizaran arieton kiu estas simila al nenio konata, kaj kiun oni povus imagi elfarita per

unutona plendo de virino kaj per
malsimplaj bruetoj de arbaro.

— Vi foriru, sinjoro—diras la ser-
visto—la serpento tuj venos, ĉarmite
de la fluto.

Sed la kobro sendube timas, ĉar
nenio ankoraŭ aperas. Se mi ne
volus konservi antaŭ tiuj nigruloj
mian allogon de Eŭropulo, mi volonte
irus promenadi en la ĝardenon.
Tamen la memestimo kaj scivolo
venkas. Mi restas.

La snakeman obstine ludas sian
bizaran arion, kiu fine kaŭzas al mi
malsaneton. Nune li aliras mian
lavoĉambron; per kataj paŝoj, korpo
iom kliniĝinta, okuloj avidaj, li serĉas
la beston.

Mi rigardadas lin, kaj — tio
multege mirigas min — unu el la
piedoj de tablo, kie mi metas miajn
spongojn, ekvivas. Malgranda kapo,
flava, leviĝas kun duobla fadeno, kiu
tremas inter dentoj similaj al dikaj
kapoj de pingloj.

Tio estas la kobro, tio estas ĝi. Mi
rigardas ĝin kiel multekostaĵon,
danĝeraĵon, kiun sendube ne plu
liberan mi vidos.

Timigite de mia lampo, ĝi estis tien
rifuĝinta, kaj, apud ĝi mi estis tute
min lavinta; mi estis sur tiu tablo
min apoginta, mi estis tie kruĉojn
metinta. Nuda, mi, ne ĝin vidante,
estis apud la malamiko. Ankoraŭ
mi dankas la Feliĉon, kiu min savis
je tiu danĝero, en kiu mi staris,
nekonscia kiel infano.

Nun, cetero, mi forgesas danĝeron
por admiri la vidaĵon. Kobro, per
ritmo de la ĉarmisto, malvolviĝas
kvazaŭ rubando tiritita de nevidebla
mano. La malhelaj okuloj de la
snakeman iĝas lumaj, kaj li hipnotas
la beston, kaj per sia kolo imitas la
balancojn, reeniras, altiras ĝin al si
per forto de rigardo, per influo de sia
barbara muziko.

La kobro forlasis la piedon de
l'meblo. Ĝi estas malgranda, flava,
ĝi estas luksa besto, nobela kaj
kruela, kun reĝa irado. Ĝi staras,
duono de ĝia korpo estas sur cetero
de ĝia kunvolvita korpo, ĝi antaŭe-
niras malrapide, fiere; la haŭto de
ruĝflava kolo malfermiĝas kiel
kroneto de orkideo; makuloj similaj
al rozkoloraj larmoj plenigas teruran
belecon de la besteto.

Jen ĝi estas apud la ĉarmisto, kies
mano malrapide kaj certe falas sur
ĝian platan kapon. Kvar fingroj
premas la ŝvelintan kolon, kaj nenian
mordon timas; la maldika fingro pre-
mas la cerbon, naskante subitan
katalepsion. La serpento estas
venkita, senmova; la fluto silentas,
korbo estas malfermita; per rapida
movo la Hindo ĵetas en sian kaptilon
la hipnotitan kobron.

Ja vere, mi ne bedaŭras la
ekscitiĝigon de tiu nokto. Ili kaŭzis
al mi tiun scenon de ĉarmo... Mia
servisto kaj la Hindo foriras, kaj mi
aŭdas ke ili mallaŭte interkonsentas,
ili dividas inter si mian monon, sian
akiraĵon.

Esperantigis el Franca lingvo
Marcel Finot.

Peto de Aŭstraj Esperantistaj Oficistoj.

De d-ro Norberto Mostl, Plenerĝ
28, Vieno XVIII, ni ricevis la sekvan-
tan peton por samideana helpo:

“En la nomo de kelkaj Aŭstraj
landoficistoj mi korege petas helpe-
majn Aŭstraliajn samideanojn, ke
ili sendu al mi iun malnovan ne plu
uzeblan ekzempleron de Aŭstraliaj
Esperantaj gazeto aŭ libreto.

“Ni Aŭstraj landoficistoj per la
mondmilito tiom malriĉiĝis, ke ni ne
povas aboni eksterlandan gazeton.
Ni estus tre volonte pretaj rekomp-
ence sendi laŭdezire Aŭstrajn leter-
markojn, bildkartojn aŭ Aŭstrajn
Esperantajn gazetojn.

“Tre volonte ankaŭ ni korespondus
kun Aŭstraliaj samideanoj.

“Kun samideana saluto kaj altes-
timo,

“Norberto Mostl.”

Legebla Skribo.

Ni tion sulkas al la alilandaj
korespondantoj, kiuj ne ĉiam bone
konas la Anglajn formojn de la
literoj. Al la administracio de “La
Suda Kruc” tio tre helpas ankaŭ,
precipe por la decifro de indiĝenaj
nomoj de lokoj. Por legebla skribo
la plej efika rimedo estas bona
fontoplumo; vidu la anoncon de nia
samideano sinjoro Haroldo Pudney
en ĉi tiu numero.

Kio Estas Natura kaj Kio Artefarita en Nuntempa Esperanto?

“Esperanto estas artefarita help-lingvo internacia, elpensita de d-ro L. L. Zamenhof.”

Jen—formulo, per kiu oni kutime klarigas la devenon de nia lingvo; formulo, kiu konstatas la pure eksterajn faktojn de tiu deveno, sed kiu ne povas esti akceptata senkon-
diĉe kaj senrezerve en sia absoluteco.

Unuaaspekto, ĉu oni povas heziti determinante naturan aŭ artan devenon de iu ajn objekto? Ĉu ne estas evidenta la diferenco inter rozo, floranta en ĝardeno, kaj rozo, farita de floristino kaj ornamanta virinan ĉapelon en moda magazeno,—diferenco inter pomo, maturiĝanta sur fruktarbo, kaj pomo pentrita aŭ farita el vakso?

Tamen, se ĝardenisto inokulas fruktarbojn aŭ florarbetojn kaj tiamaniere kreas novajn specojn de fruktoj aŭ floroj,—ĉu la produktajoj de lia kreado estas naturaj aŭ artaj? Ĉu tiaj artefaritajoj ne vivas laŭ leĝoj de naturo?

Kion ni scias pri deveno de praa homa parolo, de primitiva homa lingvo? Ĉu ni devas konsideri ĝin kiel esencan, enaskitan atributon de homa naturo, aŭ kiel artan produkton de homa kunvivado kaj kulturo, same kiel diversajn ilojn, elpensitajn de la prahomo por sukcese batali pro sia ekzistado?

Kion do estas farinta Zamenhof?

El lia famekonata “Letero pri deveno de Esperanto” ni ja scias, ke en lia kreado de lingvo internacia lin gvidis ne teoriaj filologiaj rezonadoj, sed idealaj konsideroj kaj aspiroj al tuthomara solidareco. Li ne konsultis dikegajn volumojn de lingvistiko kaj ne sentis la bezonon esplori ĉiujn eblajn teoriojn pri la esenco de la lingvoj, sed li ĉion bezonatan trovis en la vivo, ĉirkaŭrigardante en sia diversgenta loĝurbo, kiu estis por li kvazaŭ bildo malgranda, sed tute fidela de la vasta nuna mondo kun ĝiaj gentaj malamoj, lingvaj malkonsentoj, rasaj ŝovinismoj (H. Hodler). Por krei lingvon internacian li uzis kaj sintezigis la naturajn elementojn de ekzistantaj idiomoj. Li ne alportis al ni vortaron plenegan, antaŭvidinte ĉiujn detaletojn; li ne forĝis kaj ne trudis al

ni severajn regulojn, en kiuj antaŭvidis ĉiujn eblajn okazojn; prezentis nur la necesan minimumon kaj liveris al ni fundamenton, lasante al la vivo la taskon labori super la fundamento, laŭ cirkonstancoj, la postuloj de la praktiko (H. Hodler).

Jen do la esenca principo de verko de Zamenhof: unue—naturaj elementoj de da lingvo, due—natura evoluado.

Ĉu, agante tiamaniere, Zamenhof ne similas inokulantan ĝardeniston, kulturistonpli ol floristinon, fabrikantan artefaritajn florojn?

Artefaritajoj ekzistas senvive, Esperanto vivas, kiel “vivanta lingvo de vivanta popolo” (E. Privat). tion konstatas, observante Esperanton dum ĝia kvarcentjara funkciado.

Kio farigis nun la unua vorttrezo de nia lingvo? La “Universala Vortaro” de Zamenhof, enhavinta ĉion komence necesan, nuntempe kontentigas ĉiujn bezonojn: posedas dikajn vortarojn, komunajn kaj specialajn, teknikajn. Ĉu tiuj “novajn vortojn” kreis iu “plibongisto,” intencinta kompletigi la “perfektan” verkon de Zamenhof? Tute ne! La novaj vortoj estis enkondukataj paŝo post paŝo, la postuloj de la praktiko, laŭ principoj kaj reguloj donitaj de Zamenhof mem,—ili estas rezultajo de natura evoluado de la lingvo.

Ĉu niaj naciaj vivantaj lingvoj evoluas, pliriĉiĝas per tio, ke teoriuloj kaj vortaristoj enkondukas plin amase la de ili deziratajn plibonigojn, ŝanĝojn aŭ novaĵojn? Certane! Alimaniere okazas la evoluado la pliriĉigado. Ĝi rezultas precipe la agado de verkistoj, kiuj profunde amas sian lingvon kaj kvazaŭ kio timo, nur post longa kaj severa pripensado, uzas fine novan vorton sole ĉar alimaniere ili tute ne povas esprimi ian ideon (Th. Cart).

Esperanto oni ne rajtas konsideri kiel iun mas'inon, kies diversaj partoj kaj partoj estas laŭvole ŝanĝeblaj aŭ eĉ forigeblaj (Th. Cart). Ne, Esperanto estas vivanta organismo same kiel ĉiu ajn nacia lingvo! ...

Kelkajn vortojn ankaŭ pri “esperanta stilo.”

Zamenhof donis tiurilate neniu rigidajn regulojn. La unuaj verkistoj do estis lasitaj plimalpli al pro-

ontrovo,—neeviteble ĉiu el ili pli-
malpli imitadis la proprecojn kaj
partecojn de sia nacia lingvo: tial en
la unuaj verkoj de nia literaturo oni
facile povas diveni la naciecon de la
aŭtoroj. Sed iom post iom, paŝ post
paŝo, ellaboriĝis speciale esperantaj
orturnoj kaj esprimmanieroj, kiuj
radicie pli kaj pli enradikiĝadis en
la komuna uzo kaj fine donis al Es-
peranto ĝian propran spiriton, kiun
ni trovas ĉe ĉiuj niaj bonaj, spertaj
literaturistoj,—la naciecon de tiaj
verkistoj oni ne plu retrovas en iliaj
esperantaj verkoj,—la Esperantista
popolo kreis sian propran literaturan
stilon, same kiel ĝi posedas sian
propran spiriton, sian “nacian
genion”—la internan ideon de Es-
perantismo!

Originale verkis
D-ro Andreo Fiŝer, Tiflis.

Esperantistoj sur la Filmo.

Bonan reklamon donis al ni la
cinema-firmo “Paramount,” kiu
antaŭ nelonge por sia “gazeto” faris
filmon de la Sidneja Esperantistoj
en la botanika ĝardeno de tiu urbo.

Oni fotografis aron da membroj
kaj aprobantoj de la Sidneja Es-
peranto-Societo, konsilantojn de AEA,
kaj oficistojn de SES.

La filmo, kiu okupis gravan lokon
en la tiusemajna “gazeto,” estis
montrita en Sidnejo kaj Brisbano
kaj aliloke en Nova Sud-Kimrujo kaj
Aŭstralando.

Al Propagandistoj—kaj Nepropagandistoj!

Sugesto al nepropagandistoj:
inteligu la Anglalingvajn artikolojn
en “La Suda Kruc.” Kopiu kaj
sendu ilin al lokaj kaj fakaj gazetoj.

Sugesto al propagandistoj... sed
ĉi ne estas bezona; al saĝulo sufiĉas
ludo!

Dum Pasko la dua vicprezidanto
de AEA (sinjoro A. R. Cohen) vizitis
Sidnejon kaj ĉeestis kunvenojn de la
Sidneja Esperanto-Societo. Sinjoro
Cohen ankaŭ konsiligiĝis kun la
Sidneja konsilantaro de AEA pri
diversaj punktoj de la Asocia agado.

“The Esperanto Guide.”

Translation of the Exercises.

Exercise 16.—Mi estas juna kaj
vi estas maljuna, tial mi estas pli
forta, ol vi. Nun, kiam mi volas
labori, vi volas promeni. Kie ili
loĝas? En la sama urbo kiel via
onklo. Johano laboras diligente,
ĉar li amas sian patron. Infanoj, vi
estas tre neĝentilaj, vi estas eĉ mal-
ĝentilaj. La tranĉilo, kiun vi donis
al mi, tranĉas tre malbone. Kie estas
miaj filoj? Ili legas en via ĉambro,
ĉe la fenestro, kun sia fratino. Ĉiu
diras, ke la hundo estas la plej fidela
el la bestoj. Kiam oni estas feliĉa,
oni havas multe da amikoj, sed oni
havas nur tre malmulte da amikoj,
kiam oni estas malfeliĉa. Hodiaŭ
matene mi vidis vin starantan apud
la pordo de via domo. Se vi bezonos
min, vi trovos min en la kuirejo. Vi
ne trinkas, mia amiko; tamen, ĉi tiu
vino estas tre bona. La vero ĉiam
venkas la mensogon. Mi devas hejti
ĉiujn fornojn en la domo. Tenilo;
akrigilo; varmigilo.

Exercise 17.—Pardonu al ĉi tiu
bela knabino, ke ŝi revenas hejmen
tiel malfrue; ŝi renkontis sian
onklinon en la urbo, kaj ĉar ŝi tre
amas ŝin, ŝi parolis kun ŝi longe.
“Kion mi vidas? Tio estas la unua
fojo, ke tia afero okazas ĉi tie,” diris
la feino; “perloj kaj diamantoj saltas
el la buŝo de mia filino!” Mia miro
estis grandega, kiam mi vidis lin, kaj
aŭdis lin paroli tiel. Ŝajnas al mi, ke
ĉio venas de tio, ke mia avino ne
volis loĝi kun ni. Kial via frato
revenas de la urbo tiel malfrue? Ĉar
estas tiel, ni devas sendi homon tien,
por serĉi lin. Ĉu estus agrable al vi
iri tien? Multego da perloj kaj
diamantoj estis antaŭ mi. Vi devas
nur labori, por havi la saman
kapablon, kiel li. Rigardu tion, kio
eliras el la kruĉo sur la tablon. Kiam
li petos de vi monon, vi diros al li,
ke li venu al mi. Ĉu mi devas doni al
la birdoj manĝi, aŭ nur trinki? Dum
la infano laboris, la hundo saltis apud
ĝi.

Exercise 34.—Via tondilo estas tiel
malakra, ke ĝi ne tranĉas eĉ paperon.
Mi ne povas eniri; la pordo estas
ŝlosita., kaj la ŝlosilo ne estas en la
seruro. Ĉu vi volas, ke mi malstopu
ĉi tiun botelon da vino sen korktirilo?
Prenu vian poŝtranĉilon kun vi; vi

eble bezonos ĝin en la vojaĝo. Iu certe prenis mian kombilon, ĉar ĝi ne estas en la tirkesto, kaj ĝi estis tie antaŭ du horoj. Ĉu vi remetis la arĝentajn tranĉilojn en la skatolon? Li estas tiel surda, ke li ne aŭdis la sonorilon, kvankam mi sonoris tre laŭte. La sonoriloj sonas dolĉe. Bonvolu prunti al mi vian sorban paperon, ĉar tiu ĉi inko ne sekigas tre rapide. Kion vi faris kun viaj glitiloj? Mi pensas, ke mi metis ilin ĉe la piedo de la ŝtuparo, sed mi ne estas certa pri tio. Kun la helpo de miaj du vortaroj, mi povis kompreni preskaŭ la tuton de via letero. Arbaro; arbarego; domaro; ĉambraro; mezurilo.

Exercise 35.—Mi tre soifas; donu al mi trinki. Ho, kion vi donis al mi? Ian acidajon, mi pensas. Ne maltrankviliĝu, ĝi estas nur vinagro kun iom da akvo; mi miras, ke vi plendas, ĉar mi faris tion, kion vi volis. Ĉu vi ne petis de mi ian fluidaĵon? Mi dankas vin, mi neniam prenas sukeraĵojn, glaciaĵojn aŭ konfitaĵojn; simpla glaso da akvo sufiĉas al mi kun unu el tiuj kukoj. Mi ne prenas pakajon kun mi; nur dentobrosan kaj kombilon. Ni venis al la altaĵo, de kiu oni povis vidi la tutan ĉirkaŭaĵon. Kian mirindaĵon vi renkontis sur la vojo? Eksterordinaran blankaĵon, kiu glitis sur la tero, kaj haltis tuj, kiam mi haltis. Kiom estas la alto de ĉi tiu monto? Okmil kvarcent dudek futoj. Li montris grandan heroecon; li faris herooĵon. Kia naiveco! Li faras tiajn naivaĵojn.

Gazetoj Ricevitaj.

Esperanto Triumfonta: n-roj 16, 17, 18 kaj 21 (mankas numeroj 13, 14, 15, 19 kaj 20). **Bulgara Esperantisto,** n-roj 2 kaj 3. **Espero Katolika,** n-roj 1 kaj 2. **Esperanta**

Finnlando, n-ro 1. **Esperanto Junularo,** jan. **Unuigita Tuthomano,** feb. **Revuo Orienta,** n-roj 1 kaj 2. **L'Esperanto,** n-roj 12 kaj 1. **Kaŭluna Esperantisto,** n-ro 2. **La Esperantisto,** n-ro 15-16. **Hispana Esperantisto,** n-ro 45. **Esperanta Praktiko,** n-roj 25 kaj 26. **Nova Tempo,** n-ro 13. **La Progreso,** n-ro 1 kaj 2. **Amerika Esperantisto,** n-roj 2, 3, kaj 4. **Literaturo,** n-ro 1 kaj 2. **Kristana Espero,** n-ro 4. **Libro n-ro 8.** **La Eklezia Revuo,** n-ro 1. **Hungara Esperantisto,** n-roj 9 kaj 12 kaj 1 (mankas n-ro 11). **Oficiala Gazeto Esperantista,** n-ro 78. **Itala Esperantisto,** n-roj 1 kaj 2. **Franca Esperantisto,** n-roj 11 kaj 12. **Esperantista Laboristo,** n-roj 10, 12 kaj 13. **Germana Esperantisto,** n-ro 1.

En bonega reklamfolio eldonita la Dua Oficiala Specimena Foiro Barcelona, ni legas: "Ĉambroj Komercio Esperantistaj funkcias Berlin, Melburno kaj Tokio." bedaŭrinde, tio estas eraro rilate Melburnon; en tiu ĉi urbo ne ekzistas Esperantista Ĉambro de Komercio.

NOVA TEMPO

La mezeuropa esperanta kulturgazeto; sendependa. Ankau je VIA dispono. Eliras monate.

Sendu 4s./6p. al Box 1367, Elmetstr.: P.O., Melbourne.

Cole's Book Arcade, Melbourne

Two Million Books and Pieces of Music.

Send for "The Rainbow," Cole's Monthly about Books.

Free to You.

Printed for the Proprietors, The Esperanto Journal Committee, 11 George Street, East Melbourne, by Fraser & Morphet, Printers, East Melbourne Street, Windsor.